

N. N. 57,

Fratoj, al festeno bona  
Dio*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Fratoj, al festeno bona Dio  
Kunvenigis nin en kanta ĥor',  
Ĉiun zorgon tuj per energio  
Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!  
|: Kie ŝaŭmas vin', val-le-ral-la!  
Ĝoj' florigas nin, val-le-ral-la!  
Kiel de l' printemp bela flor':|

2. Gaje ni traĝoju la junecon  
Kun amikoj bonaj en kunven',  
Ili donu al ni kontentecon,  
Kaj la vino estu kora ben'!  
|: Per vinbara fort', val-le-ral-la!  
Kontraŭ iu sort', val-le-ral-la!  
Ni jen armigitaj de deven':|

3. Ne trinketu nur el la pokalo,  
Kiam plena estas la barel',  
Kiu ĝuas vivon gute en tervalo,  
Ne konscias pri vivada cel'!  
|: Vigle trinku do! val-le-ral-la!  
Malplenigu, ho! val-le-ral-la!  
Plua pleno kuŝas en la kel'!|

4. Kun lumanta sento la junulo  
Bonkuraĝe vagas tra vivad',  
Kaj kun amikeco de kunulo  
Li turnadas laŭ destina rad'.  
|: Vi do fidu min! val-le-ral-la!  
Ĝis de l' mondo fin', val-le-ral-la!  
Estos mi fidela kamarad':|

5. Ne sen uz' pasigu la junecon,  
El pokalo, laŭ konata fam',  
Vi elĉerpos veran la belecon:  
Ĉe knabina brusto kora am'!  
|: Kiam lasos nin, val-le-ral-la!  
La junec' kaj vin', val-le-ral-la!  
Nin akceptu, Ĥaron, via pram':|

...

N. N. 57,

Brüder, zu den festlichen Gelagen

1. Brüder, zu den festlichen Gelagen  
Hat ein guter Gott uns hier vereint;  
Allen Sorgen lasst uns jetzt entsagen,  
trinken mit dem Freund, der's redlich meint.  
|: Da, wo Necker glüht, val-le-ral-la!  
Holde Lust erblüht, val-le-ral-la!  
Wie den Blumen, wenn der Frühling scheint.:|

2. Lasst uns froh die goldne Zeit durchschwärmen,  
Hangen an des Freundes treuer Brust;  
An dem Freunde wollen wir uns wärmen,  
In dem Weine kühlen unsre Lust!  
|: In der Traube Blut, val-le-ral-la!  
Trinkt man deutschen Mut, val-le-ral-la!  
Wird er Mann sich hoher Kraft bewusst.:|

3. Nippet nicht, wenn Bacchus' Quelle fließet,  
Änstlich an des vollen Bechers Rand;  
Wer das Leben tropfenweis genießet,  
Hat des Lebens Deutung nicht erkannt.  
|: Nehmt ihn frisch zum Mund, val-le-ral-la!  
Leert ihn bis zum Grund, val-le-ral-la!  
Den ein Gott vom Himmel uns gesandt!|

4. Lasset nicht die Jugendkraft verrauchen,  
In dem Becher winkt der goldne Stern.  
Honig lasst uns von den Lippe saugen,  
Lieben ist des Lebens süßer Kern.  
|: Ist die Kraft versaust, val-le-ral-la!  
Ist der Wein verbraust, val-le-ral-la!  
Folgen, alter Charon, wir dir gern:|

5. Lasset nicht die Jugendkraft verrauchen,  
In dem Becher winkt der goldne Stern.  
Honig lasst uns von den Lippen saugen,  
Lieben ist des Lebens süßer Kern.  
|: Ist die Kraft versaust, val-le-ral-la!  
Ist der Wein verbraust, val-le-ral-la!  
Folgen, alter Charon, wir dir gern!|

...

Traduko de la Germana poemo "Brüder, zu den festlichen Gelagen" de N. N. 57 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919).

Arg-833-1673 (2013-02-20 17:33:26)

Tradukita de Ludwig Emil Meier (16.02.1847 - 1919 ). Tiu ĉi traduko aperis en 1907 en la kant-libro „Esperantista Kantaro“, eldonita de la Esperanta Eldonejo Hans Theodor Hoffmann en Berlino. Pri la tradukinto Ludwig Emil Meier rigardu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier).

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 57.

Arg-833-1672 (2013-02-20 21:44:43)

Aus den Breslauer Burschenliedern 1821. Tiu ĉi germana kanto aperis en 1821 en la studenta kantaro „Breslauer Burschenlieder“. La teksto troviĝas ekzemple en [http://www.markomannia.org/index.php?pid=liederbuch\\_lied&liedid=639](http://www.markomannia.org/index.php?pid=liederbuch_lied&liedid=639).

Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio. La teksto troviĝas ankaŭ en <http://www.volksliederarchiv.de/text1714.html> kaj en [http://www.lieder-archiv.de/festgelage-text\\_600574.html](http://www.lieder-archiv.de/festgelage-text_600574.html). La muziknotoj troviĝas jen: [http://www.lieder-archiv.de/festgelage-notenblatt\\_600574.html](http://www.lieder-archiv.de/festgelage-notenblatt_600574.html).